



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 14-a de Majo 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Matilda Landaŭ, Gabi Zeevi

Protokolo de la antaŭa kunsido (9-a de Aprilo 2018) – publikigita en la retejo. Aprobata!

1. Raportoj (Amri)

- a) Aperos informo pri la IK en Akko en la junia n-ro de Revuo Esperanto (Kalejdoskopio).
- b) Detala artikolo aperos en la julia n-ro.
- c) Amri tradukis la novelon pri *Lidja kaj Itamar* kiu aperis en Haarets. Ĝi aperas en la nova n-ro de IE. La aŭtoro (Prof. Joni Mizrahi) partoprenis la IK-ekskurson en la Bahaaj Ĝardenoj kaj ricevis 3 ekzemplerojn.
- ĉ) Eran komencis duan kurson de la lerneja prelegaro pri Nitsotsot en Koĥav Jair (8 lernantoj). Amri finis la kurson en "Ironi D" en Modiin (10-a klaso, 18 lernantoj), kaj komencos duan kurson (9-a klaso, 12 lernantoj) en la mezlernejo "La Hebrea Gimnazio" en Jerusalemo, la 18-an de majo.
- d) Mikaelo preparis kartludon pri israelaj e-istoj, presigos ĝin en Kijevo, ĉar tie ili kostos malpli. Li ricevis 10 biografiojn de la eminentuloj de Jehoŝua.
- e) Laŭ antaŭa decido ELI aĉetis 10 ekz. de la literatura bulteno "Ŝvilim", kiu aperigis artikolon pri Lidja Zamenhof (traduko de Amri de la artikolo de Josi Ŝemer, siatempe aperinta en IE). Ni povas ĝin vendi por 10 NIS (nia kosto).

2. Peto de Doron plialtigi la stipendion por la E-kurso

- a) Doron petis aldonon de 2500 NIS (aldone al la jam deciditaj: stipendio de 7000 NIS, kaj pago de 500 NIS por la aŭto), sume estos 10,000 NIS.
- b) Li sendis mesaĝon pri tio al ĉiuj estraranoj. Li argumentas, ke lia laboro estas pli granda pro la neatendite multe pli granda nombro de kursanoj.
- c) Proksimuma buĝeto ĝisnuna: Elspezoj: reklamado - 10,000 NIS, stipendio por Doron - 7,000 NIS. Enspezoj: kotizoj - 12,000 NIS, vendado de vortaroj – 1500 NIS. Deficito: 3500 NIS. Post plenumo de lia peto la deficito altiĝos al 6000 NIS.
- d) Post traktado en la Estraro lia peto estis akceptita kun 3 kondiĉoj, tuj poste prezentitaj kaj akceptitaj ankaŭ de Doron:
 1. Doron devontiĝas instrui la venontan kurson kun baza stipendio de 7000 NIS ĝis 15 lernantoj, kaj por ĉiu aldona lernanto super 15 – aldono de 200 NIS.
 2. Doron pagu membrecon en ELI por la du lastaj jaroj (2017-2018) kiujn li ne pagis.
 3. Reklamado okazu nur per gazetara anonco kaj Facebook, ĉar montiĝis ke la stratafiŝoj ne estas sufiĉe kost-efikaj (kun kosto de 5000 NIS ili alportis nur 2 lernantojn).

Komento: nuntempe en la kurso restas 24 lernantoj el la 32 pagintoj. Pluraj regule venas al la klubo, foje estas eĉ pli da kursanoj ol klubanoj! Espereble iuj estos ELI-anoj.

2/...



3. IK en Akko (Amri)

- a) Partoprenis 32 personoj, inter ili 4 eksterlandanoj (Jomart kaj Nataŝa, la artistoj, Edgar de Asorti, kiu hazarde estis en Israelo, kaj Benoit - provizore loĝanta en Israelo)
- b) La programo kunmetita de Amri (inkl. la antaŭ/postkongresaj ekskursoj) aperis rete (<http://esperanto.org.il/ik.html>) kaj papere. En tiu paĝo Dror aldonis du fotojn de Akko. Indas aldoni al tiu paĝo artikolojn pri pasintaj IK-oj; nun la lasta estas de 2011.
- c) Amri ĉiĉeronis la ekskursojn antaŭ (2-3/5) kaj post (4-12/5) la IK. Partoprenis nur Jomart kaj Nataŝa.
- ĉ) **Buĝeto** - Enspezoj: 1700 NIS el kotizoj (kolektitaj de Jehoŝua). Elspezoj: 183 por nomŝildoj. Repago al la artistoj: transportado - 967 eŭroj (4187 NIS laŭ kurzo de 1:4.3316, kiam oni pagis), gastejo - 1152 NIS, Edgar – 60 NIS. Sume deficino de ĉ. 4500 NIS.
- d) La gastoj petis dedukti la repagon por la transportado de ilia kotizo por la PK.
- e) Pro la malgranda nombro de partoprenantoj (2) la kotizo de la PK estis plialtigita je ĉ. 50%, sed tamen estis deficino. Amri preparis detalan bilancon kaj kvitancojn por Ŝlomo.

4. Israela Esperantisto

- a) Amri finredaktis duoblan n-ron 164-165 (2017/18, 56 paĝa). Aperis rete la 1-an de majo. Estis presitaj 250 ekzempleroj (preskosto: po ĉ. 9.5 NIS) ĝustatempe por disdoni dum la IK.
- b) Necesas dissendi al la membroj kaj al eksterlando, post aktualigo de la adresaro.
- c) Jehoŝua preparos la aktualigitan liston, Dror preparos la glumarkojn (indas aĉeti ĉiam freŝajn paĝojn), Amri sendu la kovertojn per rabatita amasa tarifo.
- ĉ) Por la venonta n-ro (166, vintro 2018) eklaboros Mikaelo kun helpo de Amri.

5. Landa kunveno (Jehoŝua)

Ĉu la kosto en WIZO (1700 NIS) estos malpli ol ekstere (ekz. Bet ZOA)? Jehoŝua esploras kaj informos la Estraron. La konvenaj datoj estas: preferata unua alternativo – 2-a de julio, la dua – la 25-a de junio. [la prezo en ZOA estis pli. Jehoshua rezervis en WIZO por mrdo, 3.7].

6. Financoj, buĝeto 2108, serĉo de oficejo (Ŝlomo)

Ŝlomo daŭrigos esplori la eblecojn. Ĝis nun li ne trovis en Jad2 en TA por nia buĝeto.

7. Salutanto en Lisbono

Dror konsentis, kaj li estis aprobita. Amri kaj Jehoŝua vortumos salutfrazon kiu enhavos informon / inviton pri la IK+MONA-kunveno en Eilat/Akaba venontjare.

8. Yagil - advokata letero

[ne traktita pro foresto de Eran]

La venontaj kunsidoj: 11-a de Junio, 9-a de Julio/ 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi